

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Hama-Ronda Vespero omaĝe al Zamenhof

Sibayama Zyun'iti

*apr. 15 [Kanagawa Kenmin Sentaa]

19 personoj kolektiĝis al nia kunveno, unu tagon kaj cent jarojn post la forpaso de L. L. Zamenhof. Inter ili estis s-ino Maria Ŝurawska [ŝurafska], vicestro de la Pola Instituto en Japanio, kaj s-ro Kujama Koiĉi, japana specialisto en tiu Instituto.

Maria salutis japanlingve, ke ŝia interesiĝo pri lingvoj dankas al ŝia patro, esperantisto. S-ro Kujama prelegis i.a. pri jenaj aferoj: (1) Pola literaturo estis enportita en Japanion ankaŭ laŭ Esperanta kanalo, t.e. novelo "Marta" de Eliza Orzeszkowa, tra la traduko de L. L. Zamenhof, estis plutradukita en la japanan, antaŭ la Dua Mondomilito, (2) En la urbo Bjalistoko, kiun li plurfoje vizitis, li trovis ke L. L. Zamenhof estis alte estimata, (3) Kiel Pola Esperanto-Asocio informas polojn pri Esperanto.

Poste, Sibayama Zyun'iti parolis pri la lastaj jaroj de L. L. Zamenhof, kaj s-ro Doi Hirokaz

revuis la Esperantujon post la forpaso de L. L. Zamenhof. En tio li montris sian foton kiam li vizitis lian tombon, kun (pruntita) juda ĉapo.

Dum tiuj prelegoj, s-ino Aida Jajoi kaj s-ro Glauco Pompilio deklamis la poemon "Majstro mortis" de Julio Baghy.



Niaj Planoj

Hama-Ronda Vespero junia (17a de junio)

Hama-Ronda Vespero julia (15a de julio)

Ambaŭ Vesperoj estos dediĉitaj al la diskuto, kiel nia rondo agu por la 104-a Japana Esperanto-Kongreso okazonta en novembro.

Movada Foiro en la Seula UK (22a de julio)

Okaze de la Movada Foiro, montrejo de diversaj organizoj, okaze de la 102-a Universala Kongreso en Seulo, Koreio, nia rondo havos tablon, kaj reklamos i.a. pri nia Japana Kongreso.

Pri la 104-a Japana Esperanto-Kongreso

Dato: la 3a, 4a, 5a de novembro 2017
Kongresejo: “Kanagawa Roodoo Plaza” (Placo por Laboristoj en Kanagawa), en la mezo de la urbo

Kotizo de homoj el eksterlando: 2 000 enoj.

Kongresa memoraĵo: Manlibro pri Jokohamo (kolora gvidlibro pri nia urbo), sendota al paginta aliĝinto, eĉ se tiu efektive ne vojaĝos al nia lando).

Por aliĝo, turnu vin al Japana Esperanto-Instituto (rete: jek2017@jei.or.jp, reteje: <http://www.jei.or.jp/evento/2017/jek/>) Pri la urbo Jokohamo, turnu vin al ni, je info@esperanto.yokohama.

Vojo al la Kongresejo

La kogresejo estas 9-etaĝa konstruaĵo, paŝe 3 minutoj de la Fervoja Stacio Ishikawa-choo. Jen estas kelkaj manieroj atingi la kongresejon.

(1) De la Internacia Flughaveno de Tokio - Narita (NRT), trajne al Fervoja Stacio Yokohama (eksprese 90 min., neeksprese 120 min). Ĉe Yokohama, transveturu al la linio Keihin-Tohoku, kaj la 3-a stacio (7 min) estas Ishikawa-choo.

(2) De la Internacia Flughaveno de Tokio - Haneda (HND), trajne al Fervoja Stacio

Yokohama (eksprese 30 min.). Ĉe Yokohama, transveturu al la linio Keihin-Tohoku, kaj la 3-a stacio (7 min) estas Ishikawa-choo.

Plano de “Manlibro pri Jokohamo”

Nia rondo eldonis en 2005 libron titolitan “Gvidlibro pri Jokohamo, havenurbo nova kaj malnova kaj Kamakura, ĉefurbo antikva”. La nove planita libro daŭrigos la tradicion, sed kun nova stilo. Jene estas la nuna skemo planata.

Ĉapitro 1: Skizo de Jokohamo

Ĉapitro 2: Gvido laŭ urbopartoj: Jenaj partoj estos traktitaj.

(Ĉirkaŭ la Strato Baŝamiĉi, t.e. Strato por Kaleŝoj, la plejfrue evoluinta urboparto / Parko Jamaŝita kaj la ĉefa havena distrikto / Ĉina Kvartalo / Motomaĉi, eŭropstila aleo / Distrikto Jamate k.a. / Ĉirkaŭ la Stacio Kannai, oficeja kaj komerca centro / Distrikto Minato-Mirai (Haveno Futura), nove evoluinta / Ĉirkaŭ Sakuragiĉo, komerca kaj kultura centro / Ĉirkaŭ la Stacio Jokohamo, la trafikata centro / Ŝin-Jokohama, t.e. nova Jokohamo evoluinta kun nova fervoja linio / aliaj partoj de la urbo / Kamakura kaj Enoŝima, proksimaj turismejoj)

Ĉapitro 3: Eseoj pri Jokohamo.

Pri Jokohamo

La Fervojmodela Muzeo en Jokohamo

SIBAYAMA Zyun'iti

En 2012 malfermiĝis proksime de la Stacio Jokohamo, La Muzeo de Fervojaj Modeloj Laŭ Hara⁽¹⁾. Ĝi elmontras ĉiutage ĉ. 1000 modelojn de trajno, nome parton el pli ol 2500 modeloj, de la kolekto de bedaŭrata kolektisto, s-ro Hara Nobutaroo⁽²⁾.

Mi vizitis la muzeon en aŭgusto 2014. Precipe okulfrapa estis la diorama parko, kie veturas trajnoj sur reloj, plektitaj en urba aŭ natura sceno – ĉio ĉi en 3-dimensiaj modeloj, kun preciza skalo je 1/32. En deko da minutoj, iluminado ŝanĝiĝas de mateno, tago, vespero kaj nokto, kaj tiam ne nur la ĉiela lumo (t.e. plafona iluminado) alteriĝas,

sed ankaŭ lampoj en la domoj kaj stratoj aŭ heliĝas aŭ malheliĝas. Iras elektraĵoj kaj vaporaj lokomotivoj kun pasaĝeraj aŭ ŝarĝaj vagonoj, kaj eĉ telfero veturas inter montetoj. En la urbo estas homofiguroj paŝantaj. Oni anoncis, ke geknaboj povas mem stiri modeltrajnojn en difinitaj horoj, kion mi deziregus, se mi estus knabo. Oni diras, ke ĝi estas unu el plej grandaj dioramaj trajnparkoj en Japanio. En tiu monato okazis speciala ekspozicio pri la 50-jariĝo de la Nova Trunklinio (ŝinkansen), kaj inter la specialaj ekspoziciaĵoj ankaŭ estis diorama de la trunkliniaj trajnoj, en alia ĉambro. Krome, en la muzeo estas alia diorama ĉambro, kiu

modeligas la centron de la urbo Jokohamo, je la skalo de 1/80, kie tamen ne veturis trajnoj.

Krom la dioramoj, la muzeo estas plena de modelaĵoj, tre fajne kaj precize faritaj, ke eĉ interno de vagono aŭ lokomotivo estas paŝita. Min interesis la historia unurela fervojo en Wuppertal en Germanio, komencita en 1901.

Laŭ la klarigoj en la muzeo, la fondinto, s-ro Hara (1919-2014) komencis fari modelan trajnon en la aĝo de 13 jaroj, kaj ĝis la morto tenis intereson. Li fariĝis inĝeniero en Kokuyo, entrepreno por oficejaj ilaroj, kaj el inter liaj inventaĵoj kiel aŭtomata var-tenejo, la ideo kaj la kono pri fervojo multe helpis.

(*1) 原鉄道模型博物館, (*2) 原 信太郎



Eseoj

Moderna Noo “Rekviemo” – interliganta Aŭŝvicon kaj Fukuŝimon

Tanigawa Hiroshi

La 14an de novembro 2016, mi spektis ĉe la Nacia Noo-Teatro modernan noo-dramon kun la titolo “Rekviemo”. Min ege interesis tio, ke la dramo temas pri interligo de Aŭŝvico kaj Fukuŝimo, kaj ankaŭ ke ĝi enhavas la utaojn de la japanaj Geimperiestroj deklamitajn okaze de la 2012-a Novjara Poemdeklama Kunveno ĉe la Imperiestra Palaco. La temo de tiujara Poemdeklama Kunveno estis “bordo”.

Imperiestro:

*Kiel estis la bordo,
kiam venis cunamo? –
Alrigardis ĝin mi desupre.
vastas maro, ja vastas
silentege, kviete.*

Imperiestrino:

*Revenon de l' amatoj
atendas kaj atendas homoj
sen la sezono ĉe la bordo.
En hajko-almanako
la vorto “bordo” mankas.*

La verkinto de la dramo estas Jadwiga Maria Rodowicz, polino naskita en 1954, kiu studis japanan kulturon ĉe la Universitato de Varsovio,

kaj en la Universitato de Tokio. Ŝi fariĝis asocia profesoro ĉe la Instituto de la Orienta Kulturo de la Universitato de Varsovio. Ŝi studis japanan kulturon i.a. noon. Ŝia onklo Atju estis mortigita en Aŭŝvico. En 2010 ŝi verkis la unuan modernan noon “Chopin, agordisto”, kiun oni surscenigis en Pollando kaj en Japanio.

Ŝi diplomiĝis kaj posteniĝis je pola ambasadorino ĉe Japanio (2008-2012). Dum ŝia ambasadoreco okazis la Orient-Japana Tertremo en 2011. Ŝi aktive helpis la damaĝitojn de la Katastrofo. Ŝi estis invitita al la 2012-a Novjara Poemdeklama Kunveno, kaj estis ege kortuŝita de la deklamitaj utaoj de la geimperiestroj. Ŝi verkis novan modernan noon elpreninte la esencon de la impriestraj utaoj.

Ĉi tiu noo “Rekviemo” estis prezentita en la 1-a de nov. en Aŭŝvico, ofere al la Sankta Porpaca Preĝejo, en la 14-a de nov. ĉe la Olimpia Teatro de Bruselo, la ĉefurbo de EU, kaj ĉi-foje en Tokio. Antaŭ la prezentado la verkintino Jadwiga parolis;

“La esenco de japana noo estas arto de rekviemo. La japana utao havas povon rekviemi

kaj reviviĝi la spiritojn de la mortintoj.”

La scenejo de la noo “Rekviemo” estis Aŭŝvico.

Aperis unu maljunulo. Li deklamis;

“Mi venis el Fukuŝimo. Mia filo mortis pro la cunamo. Mi perdis mian naskiĝlokon pro la akcidento de la atomcentraloj.”

Aperis la spirito de Atju, la onklo de Jadwiga. Ĝi deklamis;

“Mi mortis en Aŭŝvico. Kaj mian morton sekvis milionoj da malhomaj krueleĝaj mortoj”.

Aperis gvidanto ĉe Aŭŝvico el Fukuŝimo. Li deklamis;

“Aŭŝvico estas renkontejo de homa historio kaj vero. Ĝi estas loko de memorigo por ke la homoj neniam plu ripetu samajn malhomaĵojn.”

Fine la spirito de Atju deklamis la utaojn de la geimperiestroj kaj dancis dancon de revivigo de animoj kaj ĉieliro.

Estis kortremiga noo-prezentaĵo.

Ni vidis Geimpriestroj spektantaj ĉi tiun noon ĉe la seĝoj por honoraj gastoj.

Bildoj de Macumoto Ŝunsuke

Aida Yayoi

En malfrua decembra tago lastajare, mi vizitis la Muzeon de Kamakura por admiri ekspozicion de Macumoto Ŝunsuke*, pentristo ŝatata de mi. Unu artikolo sur la Ĵurnalo Asahi, kun aparte kunmetita knaba bildo, instigis min rapidi al la muzeo. Kia ĉarma knabo! Mi devas renkonti lin

reale, mi pensis.

Ĝis tiam mi ne vidis la bildon titolitan “Pomo”.

Kiam mi staris unuafoje antaŭ la malgranda pentraĵo, la knabo rigardis ien per infanecaj okuloj levante ruĝan pomon apud la lipoj. Li ravis min. En la feliĉa sento mi pensis, ke tiu

ĉi bildo valoras spekon, eĉ se la aliajn oni preterlasus. En la muzeo malmultaj homoj estis spektantaj kviete kaj malrapide unu post la alia. La kvieta etoso ŝajnis al mi tre taŭga por la pentraro de Macumoto Ŝunsuke. Pro malsano li perdis aŭdpovon en sia juneco kaj tio verŝajne karakterizis lian arton per kvieteco.

Macumoto Ŝunsuke mortis en 1948, je la aĝo de 36. Mi eksciis lin pro bildalbumo eldonita de Heibon-Eldonejo en 1963. Mia frato, laborinta tie kiel redaktanto, sendis al mi la luksan bildalbumon. La pentraĵoj ĉarmis min profunde pro misteraj linioj kaj blua koloro. Malpezaj

linioj libere etendiĝis, miksiĝis kaj aperigis kompleksan mondon kiel sonĝon. Kial li kreis tian enigman spacon? Se li pli longe vivus, kiel ŝanĝiĝus la misterplena komponado?

Aliflanke troviĝas bildoj kun diversaj konstruaĵoj ne per fluantaj delikataj linioj sed en solida formo kolorigitaj ĉefe de helbruno kaj nigro. Komence, similaj kelkaj pontoj kaj fabrikoj ne interesis min. Lia propra portreto, kiu staras impone sur la malgranda fono de fabrikoj, ŝajnis al mi stranga. Kial li pentris tiajn fabrikojn kaj pontojn tiel multe? Mi tamen trovis iom post iom belecon en tiuj konstruaĵoj; tie nenecesaĵoj estis ekskluzivitaj; nur esenco de la objekto aperigis sin klare kaj sincere. Sen ornamo la objekto vidiĝis pli belforma kaj impresa. Kiam mi rigardis “La Fabriko”-n, ĝi kortuŝis min, ĉar la simpla, malnova konstruaĵo sen eĉ unu homa figuro spegulis simplan kaj honestan vivon en Japanio malnova, kvankam ne tiel malnova sed nur en 1942. Eĥis nostalgio en mia koro, kiam mi vidis la platan bildon per fortaj linioj kaj malhelaj koloroj.

*松本竣介

